**La babiladaj rondoj** okazos je la **19h30** vendrede

La gastiganto preparas mem simplan manĝaĵon (manĝon kaj deserton). La invitatoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Je la fino, ĉiuj donacas monon al la gastiganto por partopreni al liaj elspezoj.
Okaze de kunveno ĉe Espace Dickens, ĉiu kontribuas ankaŭ al la lupago.

**"Ambaŭ grupoj"** ĉe Espace Dickens, **la 27-an de januaro (Karlota)** - la 24-an de februaro (Knud k. M.-A.) - la 24-an de marto (Rosario) - la 21-an de aprilo (Monique k. Giulio) - la 19-an de majo (Françoise).

**"Okcidentaj" :**

**la 20-an de januaro**
ĉe Rosario Scopelliti
Ch. de Barberine 6, Lausanne
021 648 76 44 / 079 264 41 08

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd

**"Orientaj" :**

**la 13-an de januaro**
ĉe Clea Robin
ch. Culaz 20, Vouvry
024 481 33 06 / 079 330 04 03

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6

***Ni informas vin ke la poŝtoficejo nuligis nian poŝtkeston 246 en Lausanne 22, ekde la 1-a de januaro 2017, dirante ke ni ricevis ne sufiĉe da leteroj.***


## Laŭzana Esperanto – Societo

ĉe F. Randin - ch. de la Vallombreuse 14 * CH – 1004 LAUSANNE
+41 76 411 14 55 * +41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
www.facebook.com/societedesperanto.lausanne
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8
Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 – Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

januaro 2017 – n° 01

**Lunde, la 9-an de januaro 2017**
**je la 20-a** ĉe Espace Dickens
***Francisko parolos al ni pri sia sperto kiel invitito dum Francia turneo.***

Lunde, la 6-an de februaro
**ORDINARA ASEMBLEO**
***... venu multnombraj !***

Lunde, la 6-an de marto
*"Falsaj amikoj" en esperanto*

Lunde, la 3-an de aprilo
*Decidota*



**Al ĉiuj !**

**Plenfeliĉan Novjaron**



**Lumegajn Kristnaskfestojn**



## Citaĵo

Estas du okazoj, kiam homo ne devus spekuli en la borsomanovro :
Kiam li ne havas monrimedojn, kaj kiam li ilin havas.



Mark Twain

## Aĉa humoro

Certe vi vidis tra la urboj kaj la kamparoj tiun afiŝon kiu ne havas signifikon en sia kunteksto :




Terure ! Sensenca ! Do ĉu ni nun loĝas en angla mondo ?? Certe ne. La angla lingvo koncernas insulanojn. Tiu afiŝo estas neakceptebla. Ĉu ni devas rememorigi, ke nia lando havas 4 naciajn lingvojn ? Ŝajnas ke jes, ĉar la federala administrado forgesis tion...

Se oni deziras altiri la atenton de la loĝantoj kaj de la vizitantoj pri la sekureco nokte, kial ne elekti la internacian lingvon :

Kial ne ? !




## Novaĵoj

La venonta Universala Kongreso okazos en Seŭlo (ekde la 22-a ĝis la 27-a de julio 2017). Jam 7 membroj de la LES planas partopreni kaj vojaĝi per la Transsiberia trajno. Bela venonta aventuro !

Nun por kvietigi la humoraĉon

## Poemo



Tenebro tomba, fenestrojn frosto premas,
en la ĉambro varme ĉe hejtilo;
kameno lumas, avino dormemas,
kaj la knabinoj ŝpinas molan linon.

Turnu, turniĝu, mia ŝpinrado,
jam de advento montriĝas forirado,
kaj proksimiĝas la Kristnaska tago !

Kiel agrable sidi ĉe ŝpinrado
dum tristaj vintraj vesperoj;
ne vanos al knabino ŝia ŝpinado,
ŝi firman havas esperon.

Alvenos junulo al lerta junulino
kun diro: Prenu min, venu al mi !
Fariĝu vi mia aminda edzino,
fidela edzo mi estos por vi.

Mi por vi edzo, vi por mi edzineto,
donu la manon, mia tre amata! -
Kaj ŝi, ŝpininta la ŝpinaĵon sveltan,
nuptajn ĉemizojn estas kudranta.

Turnu, turniĝu, mia ŝpinrado,
jam de advento montriĝas forirado,
kaj antaŭ pordo la Kristnaska tago !

Karel Jaromír Erben (1811-1870)
http://www.ipernity.com/doc/181031/11885022